

celas anstataŭigi belan grekan statuon per ia malplaca simiaĵo, tiam oni komprenas, ke tiaj vantaj penadoj estas la plej bela laŭdo al la Zamenhofa lingvo. Des pli en ĉi tiu oni ekvidas, ke ĉio estis zorge kaj de longe ellaborita, taŭge elektita aŭ vole neprecizigita, ju pli oni ekzamenas la postajn projektojn. Estas iaj eltrovaĵoj, kiuj necesigis multajn sinsekvajn perfektigojn, sed estas aliaj, kiujn geniulo fordonis tute elfinitajn kaj neplibonigeblajn al la homaro; same Minervo eliris tute armita el la Jupitera frunto.

Jen estas versaĵne la opinio de tre multaj nebabilemaj kaj nebatalemaj Esperantistoj; kvankam ne ĉiokonantaj, ili estas sufiĉe klarvidaj kaj sagacaj, por ke ne facile oni delogu ilin nek akceptigu al ili la ombron anstataŭ la kaptajon. Povu ili ĉiam esti la granda plejmulto de nia Lingva Komitato.

G. STRĈELE.

Internacia Kongreso por la Plibonigado de la sorto de la Blinduloj.

(Le Caire 20 — 25. Februaro 1911.)

Raporto de D-ro H. Dor, honora profesoro en Lyon, pri sekvanta temo :

Ĉu la elekto de Esperanto kiel universala lingvo por la Blinduloj estas aplikita, kaj, en ĝesa okazo, kiaj estas la rezultatoj praktikaj, kiujn ĝi efikis ?

... La unua persono, kiu ekpensis pri la rimedoj, kiujn Esperanto povus provizi al la Blinduloj, estis F-ino Zabylon d'Her (nuntempe Sinjorino Ranfaing), en Lyon.

Dum la somero de 1895, ŝi instruis pri Esperanto, F-inon H el ene Giroux, profesorinon blindan  e la Instruejo de la Junaj Blinduloj, en Lyon-Villeurbanne.

En 1896, F-ino Zabylon d'Her, kune kun F-ino Giroud, ĉiudiman e, faris kursojn al kelkaj blindaj lernantoj de la dirita Instituto. Ŝiaj kursoj fariĝis parole,  ar, tiun  i momenton, ekzistis nenia verko presita por la blinduloj; tiaj verkoj apenaŭ ekzistis por la vidantoj.

En 1901, juna sveda blindulo, S-ro Harald Tylander,

studis Esperanton kaj vidis tuj la gravan utilon, kiun li povus profiti, kaj ekkorespondis kun F-ino Zablon d'Her, S-ro Rektoro Boirac, kaj kun aliaj blinduloj rusaj, germanaj, svisaj, k. t. p.

Konstatinte tiajn rezultatojn, publikigitajn en niaj esperantistaj ĵurnaloj, precipe en *Lingvo Internacia* (Januaro 1902), mi ekpensis komuniki al la Kongreso de Bruxelles (6—10. Aŭg. 1902) la jenan raporton pri Esperanto kaj la Blinduloj :

« Antaŭ pli ol dek jaroj, oni provis, sed vane, krei helpan internacian lingvon, kiun ĉiu povus paroli kaj skribi krom sia nacia lingvo. Volapük baldaŭ estis konfesita nebla, kvankam ĝi havas ankoraŭ kelkajn adeptojn. Iuj germanaj scienculoj ĵus publikigis en Leipzig kaj München novan verkon, kiu tre superas Volapükon, sed tamen ne estas sufiĉe simpla. Esperanto, kontraŭe, elpensita antaŭ dek jaroj de D-ro Zamenhof, de Varsovio, havas tiom da simpleco, ke la franca « Touring-Club » ĝin elektis, kaj lernigis ĝin en kursoj faritaj en Paris, Lyon kaj aliaj francaj urboj.

En 1900, okaze de la Ekspozicio de Paris, la kunveno de la Akademioj, laŭ la propono de Generalo Sebert, Institutano, tre serioze ekzamenigis Esperanton, kiel internacian sciencon lingvon. Aliflanke, Max Müller, la eminenta profesoro ĉe la Oxford'a Universitato, skribis : « Mi devas certe aljuĝi la ĉefan rangon al la lingvo Esperanto inter ĝiaj konkurantoj ». Fine, Leon Tolstoj diras jene : « La oferoj, kiujn faros ĉiu homo de nia Eŭropa mondo, dediĉante kelke da tempo al studado de Esperanto, estas tiel malgrandaj, kaj la rezultatoj, kiuj povas de ĝi rezulti, tiel gravaj, ke oni ne povas rifuzi fari tiun ĉi provon. »

Se tiu ĉi provo de lingvo, kiun ĉiu konus flanke de sia nacia lingvo, havas veran intereson por ĉiuj, la Blinduloj tuj komprenis la tutan profiton, kiun ili de ĝi povus eltiri.

En la sveda revuo por la Blinduloj, semajna ĵurnalo, « De blindas Veckoblad », juna esperantisto, S-ro Thilander, kiu estas ne nur blinda, sed preskaŭ tute surda kaj muta, kaj plue havas difektiĝon de la manoj, publikigas esperante entuziasmajn artikolojn. Li aniĝis al esperantista grupo de Stockholm, dank' al la intermeto de F-ino Amy Segerstedt, unu el niaj aliĝintoj, malnova instruistino de Surdmutuloj, kies filantropo estas konita de tuta Svedujo, kaj kies aktiv-

eco precipe celas krei grandan sciencan kaj literaturan libraron je presliteroj Braille.

« Vi do pensu, diras S-ro Thilander en letero, el kiu mi ĉerpas kelkajn jenajn frazojn, vi do pensu pri tio, kio okazus, se la blinduloj de ĉiuj landoj, en kiuj la instruado de la blinduloj tiel mirinde progresis, eklernus Esperanton! » La ĵurnaloj kaj libroj publikigitaj en tiu lingvo ne plu estus limigitaj de la malsimileco de lingvoj, kaj do havus pli multe da legantoj kaj da aĉetantoj. Tio ebligus plimultigi gravajn verkojn por la blinduloj. Fine, kaj tio estas la plej grava vidpunkto, la disvolviĝo de Esperanto ĉe la Blinduloj igus ilin kapablaj intersanĝi siajn pensojn kun la blinduloj de ĉiuj nacioj. Oni povus tiamaniere krei veran universitaton por la Blinduloj.

Kelkaj societoj, nome, de Valentin Haüy, en Paris, de Marie Alexandrovna en St-Peterburgo; la Förening for Blindskrift en Stockholm, ne kalkulante tiajn en Anglujo, en Germanujo, en Belgujo, en Usono (Ameriko), senĉese laboras pri la edukado spirita kaj morala de la Blinduloj. Sed ankoraŭ mankas al tiaj Asocioj la ligilo, kiu ebligus al ili kunigi iliajn klopodojn, intersanĝi iliajn pensojn kaj ellaboraadojn inter la diversaj nacioj. Tiu ligilo ekzistas de nun per la internacia lingvo Esperanto. La Blinduloj faris la unuan paŝon; niavice ni devas etendi al ili la manon.

La artikolo de S-ro Ahlberg, el kiu mi prunteprenis la plimulton el la ideoj ĉi antaŭe esprimitaj, finiĝas per la jenaj vortoj: Kara leganto, ĉu vi jam pripensis pri tio, kio fariĝus via sorto, se vi estus blinda? Li kromdiras, ke, ĉar kelkaj literoj de la nova lingvo diferencas je tiuj de la aliaj lingvoj, li estas preta liveri la Braille'an alfabeton iomete aliigitan.

Sinjoroj, antaŭ du monatoj, dum maloftaj momentoj de libertempo, mi komencis la studadon de Esperanto, kaj mi facile legas ĝin, ne uzante vortaron. La gramatiko estas tiel simpla, ke oni povas ĝin lerni en duonhoro. Inteligenta blindulo, kiu havas nek niajn okupojn, nek nian distrecon, ĝin lernus facile en unu horo.

Mi do, sinjoroj, petegas vin, malvuali al viaj zorgatoj tiun novan horizonton, kiu estus por ili la fonto de veraj ĝuoj, de kiuj ili estas tro senigitaj.

Estas la Patrujo de Rodenbach, kiu taŭge devas tion iniciati.

Estas en tiu kongreso de Bruxelles, ke mi okaze altris al la afero de Esperanto mian amikon, D-ron Javal, kiu ĝis lia morto, faris tiel grandajn servojn al nia afero.

Je la sama epoko, t. e. en 1902, en Paris, S-ro Prof. Th. Cart, kies unu filo estis minacita de blindeco, siaflanke aranĝis Esperanton por la Blinduloj. Dum Septembro 1902, li diktis kurson al la junaj blinduloj de la Rifuĝejo Recordon en Lausanne (Svisujo) kaj kun helpo de S-roj Thilander kaj J. J. Monnier, li aranĝis la Braille'an alfabeton laŭ la bezonoj de Esperanto. Je la fino de Oktobro, li havis manskribe gramatikon kaj vortareton por la Blinduloj. Li trovis en Paris sindonemajn kunlaborantojn, S-ron Prof. Guilbeau, Gesinjorojn Poitevin, S-ron de Beaufront, kaj la Paris'an Grupon, kiu pagis la unuan eldonon. Tamen, la afero estis antaŭen puŝita nur en 1904, kiam F-ino Zablon d'Her organizis por la Blinduloj loterion, kiu tiamaniere disponigis al S-ro Cart la sumon da 2.348 fr. 50 c.

De tiu ĉi sama jaro, 1904, la Blinduloj havas sian monatan journalon, *Esperanta Ligilo* ⁽¹⁾, presitan Braillemaniere, kiu kalkulas nun tri cent abonantojn en 26 diversaj landoj: en Egiptujo, en Orange princlando, en Brazilujo, Ĉilio, Peruo, Meksikujo, Usono, Aŭstralio, en Kalkuta, Vladivostok, en Anglujo, en Aŭstrujo, Belgujo, Bohemujo, Bulgarujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Skotujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Norvegujo, Rumanujo, Rusujo, Svedujo kaj Svisujo. (Monata numero da 32 paĝoj, po 3 fr. jare, presita en Amiens de S-ro Couillard, blinda esperantisto.) Oni nuntempe instruas Esperanton en kelkaj Blinduloj-institucioj, en Paris, St-Mandé, Dijon por Francujo, ce la Reĝa Instituto de Woluwe (Belgujo) (Frato Isidore); en Praha (Bohemujo) (Prof. Macan); en Kopenhago (Prof. Wulf); en Tomteboda Stockholm, Boston, k. t. p.

Ni ŝuldas specialan citon al Rumanujo.

En 1906, Regino Elisabeth, konata en la tuta mondo sub sia pseŭdonimo « Carmen Sylva », ĵus inaŭguris sian belan Instituton por la Blinduloj « Vatra Luminoasa »; D-ro W. Robin en Bukarest, sciiginta pri tio, kion oni akiris en aliaj landoj, lernis la Braille skribadon, havigis al si la libron

(1) *Esperanta Ligilo*, monata revuo en relief-punktoj Braille por Blinduloj, 28 p. 14 × 23. Jare 1,20 Sm. Direktoro: Th. Cart 12, rue Soufflot, Paris.

de Cart kaj kun permeso de la Reĝino, komencis kurson al kvin lernantoj, la 26-an de Februaro 1907. Unu el ili, 33-jara, S-ro Prezenti Lévy, kiu sciis la francan, germanan kaj hispanan lingvojn, kaj kiu per skribmaŝino skribadis la tutan korespondon de la Instituto, tiel progresis, ke baldaŭ li iĝis la profesoro de siaj blindaj kunuloj.

La 21-an de Junio la Reĝino vizitis sian Instituton; D-ro Robin aranĝis specialan kurson kaj Lévy esprimis al la Reĝino paroladon en Esperanto. Ravita, ŝi ekkriis: « Kiel estas bele! vi ĝin lernis tiel rapide? mi ankaŭ lernos Esperanton », kaj, kiam oni proponis al ŝi traduki rumanen tiun paroladon, ŝi aldonis: « Mi tute komprenis ».

Kortuŝanta festo okazis la Kristnaskotagon de 1907. Juna blindulo, figuranta Esperanton, deklamis la parton de la kanto « La Espero », kiu pririlatas la universalan Pacon.

Dum Februaro 1908 la esperantista grupo de la Instituto estis fondita.

De 26. ĝis 28. Julio 1908 la Bulgaraj Esperantistoj invitis la Rumanojn al sia kongreso en Ŝumeno. Prezenti Lévy elmontris la utilon de Esperanto por la Blinduloj, kaj admonis la Bulgarojn sekvi sian ekzemplon. La Bulgara Reĝino ricevis de la Rumana Reĝino permeson por akceptigi kvar Bulgarajn Blindulojn ĉe « Vatra Luminoasa ».

Unu el ili, kiu jam konis Esperanton, estis la interpretisto de siaj kunuloj, kaj de la unua tago Bulgaroj kaj Rumanoj interkompreniĝis per Esperanto.

La saman jaron, la Gramatiko kaj la Vortaro esperantaj Braille'aj de Cart estis tradukitaj rumanen. S-ro Devoucoux, el Paris, sendis al la Reĝino esperantan tradukon de sia novelo « Dragomira », kaj ricevis permeson publikigi ĝin. Tiu ĉi verko estis presita, per Braille-literoj, de la blinduloj de « Vatra Luminoasa ».

De 1. ĝis 3. de Aŭgusto 1909 okazis en Bukarest la Kongreso de la Rumana Esperantista Societo, kiun partoprenis esperantistoj Bulgaraj, Serbaj kaj Rusaj. La Blinduloj Lévy kaj Nenkov montris la progresadon de Esperanto ĉe la blinduloj de aliaj nacioj, kaj koniĝis sian interkorespondadon kun la svedaj Thilander kaj Anderson, la norvega Imsdahl, kun la blinduloj de Woluwe (Bruxelles), la Ĉila Instituto, k. t. p.

Ŝia Reĝina Moŝto, kontentigita pro la progresado de Esperanto ĉe la Blinduloj, donacis al D-ro Robin sian por-

treton kun la jena dediĉo: « Mi esperas, ke la universala lingvo Esperanto estos la ligilo inter la blinduloj de la tuta mondo », kaj ŝi invitis la kongresanojn por ŝin viziti ĉe sia Somera Palaco de Sinaia. Tiu ĉi ekskurso, kies priskribo aperis en ĉiuj politikaj gazetoj en Rumanujo, Serbujo, k. t. p., poste en ĉiuj niaj esperantistaj gazetoj, kaj kiun ĉeestis multe da blinduloj, estas dato en la historio de nia lingvo kaj de la asocioj, kiuj celas la plibonigadon de la sorto de la Blinduloj, ĉar ĝi estas la unua fojo, kiam la esperantistoj estis akceptitaj de kronita persono.

La Reĝo de Granda Britujo, la Reĝo de Saksujo, kaj la Reĝo de Hispanujo vere akceptis la honoran prezidon de la kongresoj de Cambridge, Dresden kaj Barcelona, sed ili mem ne partoprenis, kontraŭe la Reĝino de Rumanujo ne nur partoprenis kongreson, sed plue ŝi promesis lerni Esperanton kaj ŝi donis al la esperantista Bukaresta Asocio la monopolon de la tradukado en Esperanto de la Verkoj de Carmen Sylva.

Unu pruvo de la utileco de Esperanto por la Blinduloj estas, ke, laŭ propono de Frato Isidore, via Asocio en la Kongreso de Napoli, voĉdone akceptis proponon, celantan ĝian devigan enkondukon en ĉiujn lernejojn de la Blinduloj.

Por bone kompreni la ĝuojn, kiujn Esperanto havigas al la Blinduloj, estas necese, vidi ilin en niaj kongresoj. Ĉeestis nur kelke da ili en Dresden, sed en Cambridge, ĉeestis dudek, el sep diversaj nacioj; kelkaj lernis Esperanton de nur kelkaj monatoj. Ĉiuj kune loĝis en la sama hotelo, kaj estis kortuŝe vidi ilian ĝojon, ĉar ili parolas kaj interkompreniĝas, kvazaŭ dum ilia tuta vivo ili apartenus al unu sola nacio.

Ĉu tiu ĝojo, tiu gajeco, kiun elmontras la Blinduloj en niaj kongresoj, vere elvenas de Esperanto? Ĉu ne pli vere, de la plezuro, de la distreco, kiujn la Blinduloj ĉiam sentas, kiam ili interrilatas kun aliaj personoj?

Oni ofte certigis, ke estas preferinde esti blinda ol surda; ĉar la blinduloj havas ĝenerale karakteron multe pli gajan, ol la surduloj; sed tio estas nur versaĵneco, kaj Alfred de Vigny pri tio donis tre bonan klarigon. La Blinduloj ŝajnas al ni pli gajaj, ĉar, dum ni interparolas kun ili, ili forgesas sian kripoleon; dum sama momento la surduloj suferas pro la sia. Sed, en soleco, la blindulo estas sklavo pro sia blindeco, dum la surdulo sentas nenian malbonaĵon pro sia surdeco.

Nu, estas dum soleco, ke Blindulo pli ĝuas, ĉar li povas lerni kaj legi Esperanton. Post kiam ĝin ŝi lernis, iu blindulino, S-ino Baronino Miriam de Kranichfeld, sendis sian dankon al S-ro Cart, pro tio, ke ŝi povis per liaj verkoj koni tiun lingvon, kiu « heligas sian nokton kaj mallongigas la tempon ».

La lastan jaron, iu amikino de la Blinduloj donacis sumon da 125 fr. por organizi konkurson pri la temo: « La utileco de Esperanto por la Blinduloj ». La komisiitaro ricevis ok raportojn; ĉiuj estas skribitaj de blinduloj kaj ĉiuj en Esperanto (1). Kelkaj opinias tiele: « La plej terura malamiko de homo estas la enuo », kaj ili elmontras, kiom granda estas por ili la helpo de Esperanto. « Kiom da lingvoj vi parolas, tiom da fojoj vi estas homo », diris alia. Sed ĉiuj interkonsentas por certigi, ke Esperanto, faciligante la unuigon de la Blinduloj en la tuta mondo, havigas al ili pli grandan sendependecon, kio estas por ili la superega bono. Jen tio, kion Esperanto faris por la blinduloj. Tiuj, kiuj ĝin lernis, estas entuziasmitaj, ili nomas ĝin « nia kara lingvo ».

Ĉu tio ne estus egale vera por ni vidantoj?

Ĉu niaj internaciaj (ne esperantaj) kongresoj ne estus multe pli interesaj, se, lernintaj tiun lingvon tiel facilan, ke ĉiuj, kiuj ilin ĉeestas, povus ĝin lerni en du monatoj, ni ĉiuj sukcesus nin kompreni, ne bezonante tradukistojn.

Miaparte, mi ĉeestis multajn sciencajn, medicinajn au aliajn kongresojn; sed mi devas konfesi, ke la solaj kongresoj, en kiuj ĉiuj interkomprenis sin, estas niaj esperantistaj kongresoj; kaj, pri tiu rilato, la unua kongreso en Boulogne-sur-Mer estis mirinda montro por ĉiuj, kiuj havis la feliĉon ĝin ĉeesti.

Mi do vin petegas, Sinjoroj, voĉdonigi la enkondukon de Esperanto en ĉiujn lernejojn de Blinduloj * (2).

D-ro H. Dor, hon. Prof.

Lyon, la 3-an de Februaro 1911.

(1) La blindulo, kiu ricevis la unuan premion estas S-ro Prezenti Lévy. pri kiu ni supre parolis.

(2) La Asocioj por helpo al la Blinduloj dum siaj du lastaj kongresoj en Napolo kaj en Kairo, unuvoĉe esprimis la deziron, ke Esperanto estu instruita en ĉiuj blindulejoj. (Frato Isidore, *Espero Katolika*, Okt. 1911, p. 412).

Propagando inter Blinduloj (1902-1911)

La ĉi suba tabelo de la kalkuloj de la propagando de Esperanto inter la blinduloj estos kiel « ilustraĵo » de la Raporto de D-ro Dor kaj montros la gravecon de nia movado.

KALKULOJ POR 1902-1909.

Ekspezoj.		14 644,55
Elspezoj.	{	11 841,90
En kaso.		2 802,65

(Vidu *Lingvo Internacia* 1904, p. 154; 1905, p. 354 kaj 498 kaj *Esperanto kaj la Blinduloj*, aparta broŝuro.)

KALKULOJ POR 1910 KAJ 1911.

Ekspezoj (du jaroj)

(de 1. Jan. 1910 ĝis 31. Dec. 1911)

En kaso (31. Dec. 1909)		2802,65
Donacoj		1146,30
Vendado de libroj		866,80
Kuponoj		51,95
Abonoj <i>Esperanta Ligilo</i>		999,65
		5867,35

Elspezoj (du jaroj)

(de 1. Jan. 1910 ĝis 31. Dec. 1911)

Transsenda kosto de libroj kaj korespondaj elspezoj		231,10
Kopioj en Braille, skribotaj manuskriptoj por la presado.		245,—
Presaj elspezoj por propagandaj broŝuroj kaj Raporto de Levy (nigre).		321,—
Presaj elspezoj (Braille) kaj akceto de libroj		743,35
Monhelpe por vojaĝo de Delegito al pro-blindula kongreso en Vieno (1910) . . .		50,—
Kosto kaj sendado de Ekspoziciaĵoj en Washington (1910)		51,50
Luprezo de magazeno.		200,—
Diversaĵoj: banderoloj, papero, k. t. p. . .		32,40
Elspezoj <i>Esperanta Ligilo</i> (presado, sendado)		2388,70
En kaso (en Lyono 186,65, en Parizo 1417,75)		1604,30
Bilancio :		5867,35

Propagandaj broŝuroj de « Esperanta Ligilo »

(nigre presitaj).

PREZENTI LEVY : Utileco de Esperanto por la Blinduloj. S	0,10
Esperanto kaj la Blinduloj (historio, jarlibro)	0,10
L'Esperanto et les Aveugles	0,01
Esperanto and the Blind	0,01
Esperanto und die Blinden	0,01

Tiuj ĉi broŝuroj vendiĝas por la profito de la propagando inter blinduloj.

Helpon ni certe bezonas, sed ni sukcesos, kvankam tie ĉi ankaŭ la idistoj kaj reformistoj serĉis semi la malkonfidon kaj forpreni al la blinduloj unu el iliaj plej grandaj gojoj.

TH. CART.

NEKROLOGIO

Amatus Van der Biest

Se la tuta Esperantistaro perdis, per la morto de la Prezidanto de la Sepa Kongreso, eminentulon, kies nomo estas konata kaj estimata en multaj landoj, mi persone perdis karan kaj amatan amikon. Pro tio, permesu al mi esprimi, aparte, en via revuo, kiun li regule legis kaj multe amis, kelkajn vortojn pri la intima karaktero de mia neniam forgesebla amiko.

Amatus Van der Biest estis vera Esperantisto, lia tuta animo estis plena je la intima ideo de Esperantismo : la universala frateco inter la tuta homaro. Lia fido en Esperanto estis senlima. Al li oni povus doni la laŭdon donitan iam al Romana Estro : « Li neniam malesperis pri la Respubliko ». Dum tiuj maltrankvilaj tagoj, kiam kelkaj, kiuj ŝajnis la apostoloj de nia movado, batalis sekrete kontraŭ ĝi, li neniam dubis pri la fina venko. Ofte li diris al mi : « Ne timu, nek li, nek mi, ne iu ajn, povus nun detrui Esperanton. Ni povas, ĉu helpi tiun homaman movadon kaj meriti la estontan bonfamon, ĉu esti perfiduloj, kaj gajni la eternan malestimon de niaj posteuloj, sed la estonteco estas al Esperanto. »